# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Francapor ESPERANTO

Prezidanto : M. Cuéné, 59, rue des Trois-Châteaux - 68-COLMAR
Vic-Prezidanto (junularaj aferoj) : R. Kubler, 20,rue du Ruisseau - RODEREN-68-THANN
Sekretario : J.P. COLNOT, 15,rue de Lavaux -54-LAXOU
Kasisto : J. CHAPELLIER, 109, avenue de la Malgrange -54-JARVILLE
C.C.P. : 399-75 NANCY

N° 66 Marto 1971

## Vi estas kore invitataj partopreni la 30an KONGRESON de la Orientfranca ESPERANTO-FEDERACIO en MITTELWIHR (Haut-Rhin)

La federacia kongreso okazos ĉifoje en Mittelwihr, apud Colmar, en : " Centre Socio-Culturel" la dimanĉon 28an de marto 1971.

La personoj kiuj deziras partopreni, bonvolu resendi plej frue la enteniitan aliĝilon por ke ni povu rezervi la manĝojn.

La rendevuo estas, inter la 9a kaj la 9a20 matene,en COLMAR, antaŭ la Stacidomo. Trajnoj alvenos el MULHOUSE kaj el STRASBOURG je la 9a21. La aŭtomobilistoj povos kunpreni la personojn, kiuj alvenos trajne por konduki ilin al MITTELWIHR.

Lalaborkunveno komenciĝos en MITTELWIHR je la 9a30.

1.- Ĝenerala kunveno de la Orientfranca Federacio.
  - Raporto dela Sekretario
  - Raporto dela Kasisto
  - Raportoj de la respondeculoj el la diversaj urboj
  - Debatoj kaj voĉdonoj pri tiuj raportoj
  - Renoviĝo de triono de la Federacia Komitato :

La mandato de la 4 jenaj komitatanoj finiĝas : Sroj DENIS, KNECHT, KUBLER, MANCEAU. Ili bonvolu informi la prezidandon aŭ la sekretarion, ĉu ili rekandidatiĝos aŭ ne. Novaj kandidatoj bonvolu anonci sin, prefere antaŭ la kongrestago.

2.- Preparo de la Nacia Kongreso en LYON :
  - Studo de la jarraportoj kaj aliaj tekstoj el U.F.E.
  - Elekto de nia delegito al la Nacia Kongreso, proponoj, rezolucioj, voĉdonoj rilatantaj al tiu kongreso

3.- Komitata kunveno, elekto de la nova estraro.

4.- Diversaĵoj.

- TAGMANĜO : je la 12a30 en la Kultura Centro mem.
  Menuo je 15 F., trinkaĵo, trinkmono, kaj kafo enkalkulitaj.

- POSTAGMEZE : Diversaj eblecoj, laŭ la vetero :
  - vizito al apuda vinurbeto (RIQUEWIHR) kun vizito al vinkelo (kaj gustumado !...)
  - vizito àl COLMAR (Muzeo Unterlinden)
  - filmoj aŭ diapozitivoj en MITTELWIHR.

...

Orientfranca Esperanto-Federacio

Oficiala raporto pri agado faritapor U.F.E. (Oktobro 1969 ĝis Septembro 1970)

La funkciado de nia Federacio estis kontentiga, kvankam iom malpli vigla. Ni havis 121 membrojn la antaŭan jaron,kaj nun 124 (post perdo de 30 membroj kaj gajno de 33 novaj).

La ĉefa grupo estas STRASBOURG kun 37 membroj. Estas krome grupoj aŭ grup-eblecoj en NANCY (14 membroj)MULHOUSE (8), COLMAR (6), BAR-LE-DUC (6) THANN(6) EPINAL (4), GUEBWILLER (4).

Gazetartikoloj pri loka aktiveco regule aperis en STRASBOURG, MULHOUSE, COLMAR, NANCY. Krome, por anonci korespondan kurson ni dissendis el NANCY 55 artikolojn.

Laŭ statistiko farita en junio por la Ministerio pri Nacia Edukado, funkciis en nia Federacio 10 kursoj kun 18 profesoroj kaj 148 gelernantoj. Parolaj kursoj okazis en STRASBOURG (2 kursoj kun 15 gelernantoj), BAR-le-DUC (15 lernantoj en C.E.S.) COLMAR (9), MULHOUSE (7) kaj 4 kursoj en GUEBWILLER (9) kaj ĉirkaŭaĵo : BUHL (10) LAUTENBACH(14), LAUTENBACH-ZELL (19). Korespondа kurso funkciis el NANCY kun 12 kunlaborantoj kaj 40 lernantoj en unuagrada plus 6 en supera kursoj.

La federacia kongreso okazis en EPINAL la 26an de aprilo kun 40 partoprenantoj. Okazis krome renkontiĝo (La Hingrie, 23-24ajn de majo), kaj ekskurso (Senones, 21an de majo) kun ĉiufoje 15-20 partoprenantoj.

Pluraj membroj de nia federacio partoprenis la diversajn Esperanto-arangôjn naciajn aŭ internaciajn, ĉefe la nacian kongreson en MONAKO, la U.K. en VIENO, junularajn renkontiĝojn, kaj la I.E.F.C. en Volparijà.

J.P. COLNOT.

Kompletiga agadraporto (Oktobro 1970 ĝis 15a de februaro 1971)

Jen ĝisdata kompletigo.

Ni do finis la jaron 70 kun 124 membroj. Kaj ĝis nun alvenis nur 36 novaj kotizoj. Tio estas tre malmulte (pasintjare : jam 70). La ĉefa kaŭzo estis verŝajne ke ni devis limigi la nombron de paĝoj de la Informilo je 4, kaj devis prezenti, jam en Oktobro, iom resumitan kotiztabelon. Ni provis tiel eviti eldonon de januara numero de la bulteno. Laŭ kotiza vidpunkto, tio certe estis tre malbonefika ! Ni alvoku al ĉiuj membroj por ke ili plej frue nun pagu sian kotizon !

Kursoj funkciis en STRASBOURG (1a kurso en Oktobro, 2a ekde februaro), en COLMAR (10 lernantoj),* en NANCY (3 lernantoj + nova kurso preparata kun duondekduo da aliĝoj)-La koresponda kurso el NANCY varbis ĝis nun 34 novajn lernantojn.

* en MULHOUSE (7)

J.P.C.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

NEKROLOGOJ

Nia samideano Marcel BERGEROT (Epinal) havis la grandan doloron perdi sian karan edzinon la 11an de Januaro post longa malsano.

Sino DAUMAS, fratino de nia samideanino Alice RIHN, F.D. de U.E.A. en Mulhouse, mortis en Nice la 16an de novembro 1970.

Ili ripozu en Paco. Al niaj gesamideanoj ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.

RENKONTIĜO EN LA HINGRIE - Niaj strasburgaj geamikoj denove invitas ĉiujn gesamideanojn al la renkontiĝo kiu okazos la 22/23 ajn de majo, en la ripozdomo de UFF, en La Hingrie apud ROMBACH-LE-FRANC 67-LIEPVRE. - La renkontiĝo okazos sabate posttagmeze kaj dimanĉe, Stacidomo : Lièpvre, sur Nacia Vojo n°59 inter Ste-Marie-aux-Mines kaj Sélestat.
Interesatoj skribu al S-ro ZIPFEL, 20, rue de Labroque 67-STRASBOURG.

LA ESPERANTO-VIVO en .....

STRASBOURG - La unua kurso en Schoepflin-lernejo funkciis kun 10 lernantoj. Dua kurso komenciĝis la 17-an de februaro. Gvidanto : Sro ZIPFEL (sekvo paĝo 3)

## JEFO informas

Dum 1970 la Junulara Esperanta Franca Organizaĵo JEFO oficialiĝis. Ĝi nun ankaŭ havas sian propran poŝtĉekkonton :

"Organisation de la Jeunesse Espérantiste Française "
34, rue de Chabrol - 75-PARIS 10è - CCP 31 709 94 La Source.

Se vi estas junulo ĝis 25-jara aŭ studento, sendu vian kotizon por 1971 al tiu poŝtĉekkonto. Ne forgesu indiki vian naskiĝdaton, kaj mencii , ĉu vi estas studento. Vi tiam krome ricevas "Koncize", la bultenon de JEFO. Se vi estas studento, vi fariĝas aŭtomate membro de SFELO, kiu estas la studenta fako de JEFO.

Aliflanke, iu ajn povas ricevi "Koncize" pagante minimume 5 F. al la poŝtĉekkonto de JEFO. Profitu de tiu okazo por iel subteni la junularan movadon, kaj samtempe ricevi informojn pri ĝi.

Sed "Koncize" ne nur donas al vi informojn el Francio, sed ankaŭ el Belgio, Germanio, Italio kaj Nederlando, ĉar ĝi samtempe estas bulteno de ties landaj junularaj sekcioj.

Por ricevi pliajn informojn kaj prov-ekzempleron, skribu rekte al la kasisto (se eblas, enmetante poŝtmarkon) :

André GROSSMANN, Bât. D.2.
Rue de la Doller
68 - ILLZACH.

La Kasisto de JEFO
A.GROSSMANN

Sekvo de la paĝo 2 LA ESPERANTO-VIVO en ....

COLMAR - Kurso funkcias kun 11 gelernantoj (Gvidas s-ro Cuéné)

BAR-LE-DUC - Kunveno okazis la 28-an de januaro kun 8 partoprenantoj al kiuj S-ro DENIS prezentis diapozitivojn pri Ĉehoslovakio. Ĉu revekiĝo ?

MULHOUSE - Kurso en la Popol-Universitato kun 7 lernantoj.(Gvidas S-ro Lienhardt)

NANCY - Ni anoncis per 10 gazetartikoloj, radioanonco, 100 Espéranto-Actualités, centoj da flugfolioj, dekoj da afiŝoj, 2 informkunvenojn pri Esperanto en Nancy, dum novembro, 1 en Laxou en decembro. Aliĝis nur 3 personoj. Nova informkunveno okazis en la Socia Centro de Nancy-Beauregard la 5-an de februaro kun (unuafoje !) deko da ĉeestantoj. Kurso tre baldaŭ ekfunkcios kun 5-6 gelernantoj.

---

## Aliĝilo al la 30a Fed.Kongreso en MITTELWIHR

Bonvolu resendi kiel eble plej baldaŭ al Sro Marcel Cuéné, 59, rue des Trois-Châteaux
68 - COLMAR

NOMO : Antaŭnomo :

* partoprenos la 30an kongreson en MITTELWIHR la 28 an de Marto

* ne ĉeestos

* el miaj familianoj partoprenos : la edzino kaj ....... infan(j)

* ni partoprenos la komunan tagmanĝon

* ni ne partoprenos la manĝon

* dezirus trapasi eventuale la ekzamenon :

---

Mi alvenos je la horo, trajne, aŭtomobile.

...

COTISATIONS 1971

L'appartenance à une société, quelle qu'elle soit, comporte comme devoir, au début de chaque année, le paiement d'une cotisation servant à aider au bon fonctionnement de cette société ; il est demandé à chaque membre de bien vouloir régler cette cotisation le plus tôt possible, mais au plus tard le 31 mars.

Pour vous permettre de remplir cette règle et de ne pas risquer la suppression de l'envoi des bulletins et revues correspondant à la cotisation que vous avez choisie, le trésorier dont l'adresse suit, compte sur votre règlement très prochain et à l'avance, vous en remercie de tout coeur.

Si vous avez déjà cotisé, vous trouverez ci-jointe la feuille de coupons 1971 imprimée en mauve, comportant en bas, la vignette justificative à découper et à coller sur votre carte de membre.

Monsieur J. CHAPELLIER -109, avenue de la Malgrange -54-JARVILLE- CCP : 399-75 NANCY

| | Membres âgés de : moins de 21 ans | plus de 21 ans | Reçoit : |
|---|---|---|---|
| 1/- Membre Adhérent (UFE & UEA) | 7,00 f | 7,00 f | A - B - F - |
| 2/- Membre Titulaire "Junior" | 16,00 f | --- | A - B- C- F- |
| 3/- Membre Titulaire | --- | 31,00 f | A - B- C- F- |
| 4/- Membre Individuel (M.J.) | 27,50 f | 54,00 f | A - B- C- D- F- |
| 5/- Membre Individuel (M.A.) | 50,50 f | 77,00 f | A-B-C-D-E-F- |

Selon la cotisation choisie, vous recevrez :

A/- carte de membre de UEA (pour les nouveaux adhérents) et feuillet de coupons 1971 donnant droit aux services des 3500 délégués mondiaux.
B/- Bulletin trimestriel "Esperanto-Actualités"
C/- Revue française d'Esperanto (bimestrielle)
D/- Annuaire International (adresses des 3500 délégués mondiaux)
E/- Revue mensuelle de U.E.A. "ESPERANTO"
F/- Bulletin de la Fédération de l'Est pour l'Esperanto "LA INFORMILO".

En outre, les Membres Titulaires et M.J. de moins de 25 ans (cotisations : 16,- 27,50, 31 et 54 f) recevront en plus le bulletin des Jeunes : "Koncize". Les Membres MA de moins de 25 ans recevront "Koncize" et la revue pour jeunes : "Kontakto". On peut s'abonner à part :
à KONCIZE : pour la somme de 5 f - à KONTAKTO : 12,50 F au-dessus de 25 ans d'âge
8,-- F au-dessous de 25 ans.

N.B.- Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg dont la trésorière est F-ino Violette FIX, 13, rue Louis Apffel, 67-STRASBOURG, sont priés de verser leur cotisation au : CENTRE CULTUREL ESPERANTO CCP 499-17 STRASBOURG en y ajoutant leur cotisation au groupe, qui s'élève à 5 fr.

Il est demandé aux membres âgés de moins de 25 ans d'indiquer leur date de naissance.

---

* Mi kandidatiĝas kielkomitatano

* Mi ne kandidatiĝas

* Mi proponas ke la 31a kongreso okazu en :

* Pluaj sugestoj (i.a. preferoj, proponoj pri la posttagmeza programo).

(Se vi ne povos ĉeesti) * Mi transdonos mian voĉon al :

aŭ * Mi transdonos mian voĉon al la Asembleo

Subskribo :

* Forstreku la netaŭgajn vortojn !